Kvina de oktobro : Tutmonda Tago de Instruistoj

Mesaĝo de la prezidanto de ILEI al la membroj

Karaj gekolegoj,

Jam estas la sesa de oktobro chi tie en Nepalo, kie mi nun restadas.
Do mi pardonpetas pro la malfruo.

La ĉi-jara temo, frapfrazo, de UN devas gvidi nin al pripenso:
Jen ĝi : RAJTO AL KOMPETENTA INSTRUISTO.
En nia Movado ni observas, ke komencantoj entuziasmaj komencas instrui ĉu al amiko, najbaro, ĉu en jhus kreita grupo. Tio tutcerte estas pozitiva paŝo. Por plibonigi la situacion, ILEI lanĉis tri programojn, kiuj ne atingis sukceson. Do trista konstato.

Estas nia morala devo progresi en niaj lingvokapabloj kaj en niaj instrukapabloj. Por atingi tiun lastan celon, ni povas interŝanĝi spertojn parolante kun kolegoj, ni povas legi la organon de ILEI: IPR, ni povas partopreni kursojn, seminariojn kaj kongresojn, ni povas inviti spertulon en nia kurso kaj peti, ke tiu fakulo komentu nian instrumanieron, ni povas legi teoriojn pri pedagogio en diversaj libroj kaj retejoj, ekzemple tie http://www.ilei.info/dok/peddok.php kaj tie www.edukado.net. Tamen la bona instruado venas el praktiko kun honesta takstado de la laboro. Per la nunaj teknikiloj iu povas meti kameraon en sia klasochambro kaj filmi sian lecionon. Poste tiu instruisto povos vidi kaj aŭdi sin mem kaj eble konstatos plibonigendajn agojn kaj dirojn.
Konklude mi volas danki vin pro via agado favore al la disvastigo de nia lingvo.

Tutmonda Tago de Instruistoj, 2018

Ekde 1994, en la 5-a tago de oktobro, oni festas la Tutmondan Tagon de Instruistoj. La ĉijara temo estas “Rajto al edukado estas rajto al kompetenta instruisto”.

Unu el la ĉefaj defioj por tutmonde plenumi tiun rajton estas la dãura manko de instruistoj. Ekzistas, tutmonde, ĉirkaŭ 264 milionoj da infanoj kaj junuloj ekster lernejoj kaj, laŭ Instituto pri Statistikoj de UNESCO, la mondo bezonas varbi preskaŭ 69 milionojn da novaj instruistoj por plenumi la 2030-an edukadan celon universaligi unuagradan kaj duagradan edukadon.

Edukado ŝanĝas vivojn: estas bazo de ekonomia kaj socia evoluigo; akcelas pacon, toleremon kaj socian inkluzivigon; estas ŝlosilo por fini malriĉecon kaj atingi personan plenumiĝon. Instruistoj estas la iloj, per kiuj edukado disvastiĝas.

Senvalorigita instrua profesio havas negativan efekton en kvalito de instruado kaj lernado. Pro tio la internacia komunumo, akceptante la 2030-an Celaron, devigis sin garantii, ke “instruistoj kaj edukistoj estu povigitaj, taŭge varbitaj, bone trejnitaj,

profesie diplomitaj, motivitaj kaj subtenitaj de plenrimedaj, kompetentaj kaj efikaj registaraj sistemoj.

Legu pli en un.org.